


trimestriel
4^{ème} trimestre
2013

LA INFORMILO

N° 164
31 décembre
2013



l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières



espéranto
France-Est



Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements
Bas-Rhin (67)
Haut-Rhin (68)
Meurthe-et-Moselle (54)
Meuse (55)
Moselle (57)
Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
"Philippe Desforges"
27, rue de la République
FR – 54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO


annuel / jara

15€


eksterlando

18€

LA INFORMILO pleure son rédacteur en chef.



Pol DENIS nous a quittés après une longue vie au service de la LANGUE INTERNATIONALE. Pendant des décennies il a également sillonné le monde et sa bonne humeur perpétuelle a charmé tous ses interlocuteurs. Quelques réactions de ses collaborateurs et lecteurs les plus proches dans ce dernier numéro de LA INFORMILO sont des témoignages d'amitié et d'admiration pour cet infatigable défenseur des Droits Humains.

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Provizore por ĉi-tiu numero Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro Pol DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asseseurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.95.55	michelinelcolnot@orange.fr
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	fredporretti@gmail.com
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06.34.33.68.93	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.86.42	bertrand.wick@orange.fr
S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr	

Abono al La Informilo →	Francio: 15 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Esperanto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur : Pol DENIS Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par l'imprimerie de l'encre 55000 Hargeville-sur-Chée</p>
--	--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

Karaj gefederacianoj !



Emociigis nin ĉiujn la forpaso de nia amiko Pol. Plurajn paĝojn pri lia memoro vi trovos en ĉi numero de LA INFORMILO. Kun André GROSSMANN ni finpreparis tiun bultenon, por kiu Pol jam arigis plurajn artikolojn.

La longjaran laboron de Pol neniuj pretas daŭrigi kaj tre verŝajne ankaŭ ESPERANTO-FRANCE-EST plu-informas per la reto.

Al la jamaj abonantoj de la venonta(j) jaro(j) ni eventuale proponos kompencon. Kun bedaŭro !

Edmond LUDWIG

Pour vous initier à la seule vraie langue internationale...

Pour vous perfectionner ou éprouver le plaisir rare de converser en espéranto !...

Pour profiter de nos stages, de nos rencontres, de nos congrès, de nos voyages

la solution:

Un cours personnalisé chez soi !



« Saluton Karin' - Sauton Petro ! jen surprizo !... »



Deux maîtres-mots de notre cours par correspondance: *rapidité, efficacité !*



- *** un matériel adapté
- *** une technique éprouvée
- *** un réseau d'animateurs performants
- *** un savoir immédiatement opérationnel

Une diffusion sur toute la région et au-delà !

Edmond LUDWIG

26, route de la Schlucht

68140 STOSSWHIR

Tél: **03 89 77 52 56**

Nous mettons à votre disposition le site internet de notre association *Espéranto France-Est*

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

également accessible par

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vous serez informé non seulement sur l'histoire et sur la vie actuelle de notre association, mais encore sur les activités des groupes locaux, sur les initiatives des espérantophones isolés ...

et sur l'Espéranto en général ! Également à votre disposition la liste actualisée de notre « libro-servo » !

Plusieurs liens vous permettront de découvrir d'autres sites originaux en France et dans le monde.


Notre rubrique "albums photos", complétée en permanence, vous offrira un panorama original des événements régionaux et ... extérieurs !

une visite s'impose !

<p>Organizita de</p> <p>MULHOUSE ESPERANTO</p> <p>En amikaj rilatoj kun BAVELO</p>	<p>75a printempa staĝo de</p> <p>France-Est</p>
<p>Okazos la 4 / 5 / 6-ajn de aprilo 2014 En la Feriejo Le Torrent 4, rue de Mollau, 68470 STORCKENSOHN</p>	



Ĉi-tiu ferio-komplekso situas meze de altaj Vogezoj, ĉe rando de arbaroj en mirinda sep-hektara parko. Ĝi troviĝas survoje inter Thann kaj Bussang. Apartaj duŝejo kaj necesejo por 2 ĉambroj.



Atingeblecoj:
 Plej proksima stacidomo de la staĝejo troviĝas je 3 km en **Wesserling**. Inter **Mulhouse** kaj **Wesserling** veturas pluraj regulaj trajnoj kaj aŭtobusoj en la tago. Ni povos sendi al vi la diversajn horarojn inter tiuj du stacidomoj kaj laŭ peto ni veturigos vin de la stacidomo de Wesserling al la staĝejo.

Prelegoj de Hannes Larsson



Hannes Larsson naskiĝis en Nokia, Finnlando en 1931. Li diplomiĝis ĉe la Teknika Universitato de Helsinko. Sian karieron kiel inĝeniero li faris en Finnlando, Francio, Italio kaj Belgio. Hannes specialiĝis pri la rezisto de strukturoj

kaj materialoj kaj laboris inter alie en du kampoj de pinta teknologio : la spaco (strukturoj kaj kontrolo de temperaturo de satelitoj) kaj la problemoj de nukleaj reaktoroj. Liaj ŝatokupoj

estas la muziko, la matematiko, la skikurado (li partoprenas plurajn popularajn longdistancajn skikuradkonkursojn en pluraj landoj kaj skikuradas pli ol 1500 km ĉiujare), kaj de kelkaj jaroj Esperanto.

Hannes jam organizis seminarion pri distraj matematikoj en la UK de Bjalistoko kaj prelegis en la UK de Rejkjaviko kadre de la Kongresa Universitato.

KURSOJ

- A: Komencantoj (débuts)**
Cours pour débutants par Ginette Martin. Elle apportera le matériel adéquat.
- B: Kurso por progresantoj**
Gvidas Roberto Kueny
- C: Progresintoj:**
Paroliga kurso tute en Esperanto. Gvidas Edmond Ludwig
- D: Seminario:**
Prelegas Hannes Larsson

Sabate posttagmeze:
 La violono. Tio inkluzivas ĉion: historio, violonfarado, ludtekniko, komponaĵoj kaj violonistoj.

Dimanĉe matene:
 Spertoj de novaj esperantistoj
 La etoso de la prelego estas humura. Esperanto estas ja universala lingvo, sed necesas alkutimiĝi al la akĉentoj de la hispanoj, britoj, rusoj, japanoj kaj (por eksterlandanoj) la francoj.

Distra vespero
Kantos Mélanie PRIN
 Jen nova juna talento ! Ŝi kantas en pluraj lingvoj, inter aliaj en Esperanto. Talento malkovrita dank'al
<http://pola-retradio.org/>



Aktualigitaj informoj kaj aliĝilo aperas en nia retejo:
<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

<p><u>Provizora Programo:</u></p>	<ul style="list-style-type: none"> • 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo • 14a30/18a Kursoj A, C, kaj E. • 19a30 Vespermanĝo • 20a30 Distra vespero • Knajpo
<p><u>Vendrede 4-an de aprilo 2014</u></p>	<p><u>Dimanĉe 6-an de aprilo 2014</u></p>
<ul style="list-style-type: none"> • 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj • 17a30 eblas libere viziti • 19a30 Vespermanĝo • 21a45 Malfermo de la knajpo. <p><u>Sabate 5-an de aprilo 2014</u></p> <ul style="list-style-type: none"> • 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo • 9a30 Vizito al milita tombejo Vieil Armand aŭ Hartmannswillerkopf • 12a Reveno al la staĝejo • 12a30 Tagmanĝo • 13a30/14a30 Akcepto de la alvenantoj 	<ul style="list-style-type: none"> • 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo • 9a30/12a Kursoj A, C, kaj E • 12a30 Tagmanĝo • 13a30 Komitat-kunsideto • 14a • Poste: disiĝo

Aliĝilo 75a Regiona Staĝo de Esperanto en Storckensohn la 4-6ajn de aprilo 2014

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ- kotizo	Elektita kurso
1		ĉef-aliĝanto			
2		kun-aliĝantoj			
3					
4					

Adreso

Mi preferas, ke mia adreso ne aperu en la dokumentoj disdonataj dum la staĝo (signu) Mi preferas vegetaran manĝon (signu)

Telefono:

Ret-adreso:

Mi pagas (minimуме la aliĝkotizon) jenan sumon:

per ĉeko per ĝiro al Yves STUTZ per internacia ĝiro al nia peranto en Germanio

Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Nombro da manĝoj kaj da tranokta- doj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tagmanĝo			
Vespermanĝo			
Tranoktado : nombro da personoj			
Ĉambro:	1-lita (kun suplemento)	2-lita	3-lita
Prefero kaj nombro da personoj			

Eksterlandaj partoprenantoj
ricevos senpage nian bulte-
non **La Informilo** dum unu
jaro.



La aliĝ-kotizo entenas la par-
toprenon al elektita kurso aŭ
prelego kaj al la distra vespero.

**Bonvolu sendi la aliĝilon kaj
vian antaŭpagon al :**

Yves Stutz,
45A, Avenue Charles de
Gaulle
68700 Cernay

**Ĉekoj je la nomo de: Yves Stutz
Internaciaj ĝiroj al: Yves Stutz
IBAN:**

FR7610278035100001386770771

BIC: CMCIFR2A

Por Germanio al nia peranto:

je la nomo de: Hans-Dieter Platz.
(menciu la celon de via pago)

Poŝtĝirokonto:
918 56-676 (BLZ 545 100 67)

PGA Ludwigshafen

Pliaj informoj ĉe:

ystutz@voila.fr
Tel. 06.38.63.20.79

ALIĜOJ	antaŭ la 1a de februaro 2014	ekde la 1a de februaro 2014
Ĉef-aliĝanto abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio	20 €	25 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef- aliĝanto)	15 €	20 €
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj	2 €	4 €

Restado-kostoj	
Duon-pensio: (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 1 manĝo)	40 €
Kompleta pensio (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 2 manĝoj)	47 €
Suplemento por individua ĉambro	9 €
Apartaj manĝoj	16,50 €

Kelkaj reagoj post la forpaso de Pol.

Li ne plu estas kun ni. Li forpasis subite...

Il est décédé ce jour, subitement il s'est écroulé et n'a pu être réanimé, en arrivant de retour à domicile à Bar-le-Duc après une courte intervention estimée bénigne.

Sa vie ayant pour partie porté sur l'espéranto et son soutien à cette belle et noble idée soutenue par l'édition de la Informilo, il aurait sûrement apprécié que l'on partage cette pensée passionnée et que ce message vous soit adressé.

C'est grâce au numéro 163 de septembre sous les yeux que vos adresses ont été collectées, recopiées et que je peux vous écrire.

Le plus bel hommage que nous puissions lui faire c'est de trouver les idées pour que la Informilo continue. Mon engagement professionnel associé à de nombreux déplacements pour quelques années encore m'écartent d'une aide bien concrète.

Et bien que fidèle abonné je n'ai pas assez entretenu mes connaissances dans la langue de Zamenhof pour vous aider sans utiliser le français...

Pour autant je veux bien contribuer à quelques échanges, mais plus tard. Vous comprendrez que dans l'immédiat l'heure soit au recueillement familial.

Ma maman Camille, son épouse depuis tant d'année est anéantie, ses filles mes deux sœurs Diana et Isabelle, ses 5 petits-enfants, ses 5 arrières petits-enfants et l'ensemble de la famille est atterrée.

Et comme il l'écrivait à propos d'un professeur en page 21 : "La langue, c'est la pensée"

dans un article malheureusement titré : "Forlasis nin grava subtenanto de Esperanto"

Bertrand DENIS Vandœuvre-les-Nancy



Kara Pol,

Iam, kiam ni eksidis por komuna vespermanĝo en mia hejmo, vi jam estis formetinta la klaŭnvestaĵojn, en kiuj dumtage vi trape-tolis – alinomita Larry Danto/La Ridanto - la aleojn de la libro-foirejo de COLMAR, kie TAKE, la partnera asocio de EFE, dum pluraj jaroj havis budon. Ŝajnas, ke tiu laboro en tiu brua etoso, tute ne lacigis vin, ĉar via humuro gajigis la tutan vesperon, pri kio miaj kunfamilianoj daŭre memoras.

La rekompenco estis la reliefigita ĉeesto de ESPERANTO en la paĝoj de la regiona gazeto DNA.

Mia insistado pri via daŭra preteco bonhumori kaj ŝerci tamen ne kaŝu vian seninterrompan laboremon je la servo de Esperanto jam paralele kun via profesia deĵorado.

Vi despli agadis post via emeritiĝo, ne nur por Esperanto, sed ankaŭ en pluraj aliaj porhomaj asocioj.

Sed plej impresis miajn samideanojn via pli ol kvardekjara produktado de LA INFORMILO ! Via nura "salajro" estis la pli kaj pli nombraj laŭdoj, kiuj venis ne nur de nia regiono, sed de aliaj partoj de Francio kaj eĉ de eksterlando.

Kara Pol ! Ni ne forgesos vin !

Edmond Ludwig



Jen la momento, kiam kutime mi ricevis unuan averteton de Pol pri la proksimiĝo de la limdato por sendi libroservan artikolon presotan en la Informilo.

Ĉi foje aperis mesaĝo ne de Pol, sed de lia filo Bertrand, kiu bedaŭrinde anoncis novaĵon, kiun oni kredis senĉese prokrastebla, sciante la rimarkindan bonstaton de la prizorganto de la regiona revuo.

Mi ekkonis lin antaŭ pli ol tridek jaroj. Mi estis tiam apenaŭ pli ol 20-jara kaj eliris de nelonge el la licea tempo. Nun miaj haroj malmultiĝas kaj griziĝas. Mi eksentas maljuniĝon. Pro tio mi miris, ke dum la sama periodo, Pol apenaŭ ŝanĝiĝis !

Ĉiam la sama vigleco kaj intelekto ! Kiam antaŭ kelkaj jaroj, mi pene remarŝis post akcidento, mi amuze

legis poŝtkarton lian, kie li rakontis pri siaj surrakedaj promenadoj !

Konante lian aĝon, mi kelkfoje demandis min, kiel lin trafos la fino. Kaj mi ofte pensis, ke tiu-ĉi okazos subite, neatendite; kaj mi eĉ esperis ĝin tia por Pol : mi estintus afliktita, se li estus iom post iom kadukiĝanta .

Sed vidante lin tiel vigla, mi esperis, ke la morto forgesos lin, tiel bonfartan, ankoraŭ dum dek, eble dekvin jaroj !

Tiel ne estis. Kaj la ĉagreno atingis lian familion kaj nin.

Jean-Luc THIBIAS

Via informo pri la subita morto de Pol Denis estis ankaŭ por mi kvazaŭ ŝoko. Sed mi devas konfesi ke mi ne estis taksanta lin je aĝo de 88 jaroj, sed multe pli juna. Mi esprimas al Vi kaj al via E-asocio mian elkoran kondolencon. Jes ja, mi tute komprenas la forpason de tia aktiva – kvankam maljuna – homo granda perdo. Mi deziras al Vi kaj al via tuta grupo, ke Vi povu tamen daŭrigi vian bonan agadon.

Sincere kaj amike

Josef BRAUN

Pol Denis, en mia memoro, ne nur kiel esperantisto, estas grava persono.

Mi ne scias, kiu sin vere kaŝis malantaŭ tiom da inteligenta humuro kaj ĉiama gajeco. Pol Denis estis kapabla samtempe montri la saĝecon kaj la ŝercemon, kiuj estis egalrajtaj en liaj sintenoj.

Fakulo en spritaĵoj, postulita epikuristo, Pol Denis certe neniam tedis, eĉ se povus esti iom da tiklado kaj miro vidi tiun homon daŭre preni sur sin la tempopason sen perdi la vigecon kaj la amon al la vivo, kvazaŭ li estus eterna junulo.

Pol Denis sukcesis majstre mastri La Informilon, kies regiona komunumo de Esperanto povas esti fiera. Pol Denis ofte enkuraĝigis min por miaj skriboj, eĉ se li estis ĉiam iom tro pardonema.

Ni perdis fraton, patron, amikon. Nun restas al ni vivi lin en niaj sintenoj, pensoj, agoj. Li estis unu el tiuj lumturoj, kiujn oni tro malofte renkontas sur sia vojo. Dank' al sia forta personeco kaj malgraŭ la forpaso li daŭre donos al ni lumon por nia ĉiutaga vivo kaj nia esperantisteco.

Dankon Pol Denis. Kie vi estas ni iros. Sed nun kaj tiom longe, kiom ni kapablas pensi, vi restas vivanta en niaj memoroj kaj estos nia kunulo en niaj vivoj kaj agoj.

Al ĉiuj proksimuloj de Pol Denis kaj al tiuj, kiujn li amis kaj/aŭ lin amis, mi aparte postulas esti iamaniere membro de via familio kaj kredu min, mi ne nur per simplaj vortoj kunsuferas pro la foriro de nia amiko Pol Denis.

Ni ĉiam lernos de li kaj ekde nun aŭskultas lin severe grumbli kun ni, por ke ni ĉesu plori kaj estu feliĉaj kaj por daŭre kaj gaje alfronti la batojn de la vivo.

Masevaux (Francio), la 22-an de novembro 2013.

Bernard Behra

Paul estis tiom dinamika, li jam preparis la sekvan numeron de La Informilo. Lia malapero faros grandan vakuo en nia federacio.

Karaj amikoj, restu bonfartaj kaj aktivaj, por ke la vakuo ne estu tro granda.

Amike al vi ĉiuj en nia komuna funebrado.

Ginette MARTIN

Pol ĉiam kiel redaktoro tre valorigis eventojn kaj artikolojn en nia bulteno "La Informilo". Mi ne forgesos ĉiam lian ŝercemon kaj liajn ridetojn ! Lastfoje mi renkontis lin en la seminario de Orthenberg (DE). Bonajn memoraĵojn mi havas de li ! Grava perdo en nia movado !

Amike al vi ĉiuj en nia komuna funebrado.

Bruno HENRY



"amika tago"

Ĝuinda rendevuo ! 5-an de oktobro 2013

Ĉi-jare estis la vico de nia *Gérardmer-klubo* inviti la germanajn esperantistojn.

La vetero estis griza, iom pluveta. Nia unua celo estis la "muzeo de la Soyotte" apud *Saint-Dié*, sed ni unue devis kunveni en diversaj rendevuo-punktoj.

En *Gérardmer*, mi kuniĝis kun 3 partoprenantoj. Mi decidis ŝofori sola, en la okazo se oni poste bezonus mian veturilon kaj ĝiajn tri liberajn lokojn. En la rendevuo de *Anould*, mi havis bonŝancon. *Simone* ĵus alvenis kun 3 amikinoj ...



"Ĉu vi povas preni miajn kondukitojn en vian veturilon, mi devas fari paperojn kun la persono, kiu koliziis kun mi hieraŭ, kaj poste mi trovos vin ĉiujn ĉe la muzeo.

- Kvin germanoj anoncis sin por la sekva rendevuo-loko !

- Ne kvin germanoj, sed naŭ !" ... kaj tuj aperis en la sekva veturilo Inge kun kvaropo, eĉ la bebo Julia estis kun ili. Kia bona surprizo !

Apud la muzeo de la Soyotte, la dua grupo de germanoj aldoniĝis, kaj revenis Simone, kiu intertempe akirintis la laŭleĝajn paperojn.

La gvidantino de la farmomuzeo akceptis nin en la kuirejo, kie estis jam preparitaj panoj baldaŭ kurotaj en la ŝtona bakforno ; nur minuto sufiĉis al la bakisto por konstati ke la bakforno estas preta por baldaŭa bakado; per bonbono *shamallow* oni testas la temperaturon de la forno !

Poste nia gvidantino kondukis nin de ĉambro al ĉambro; mi komencis traduki esperanten. Kaj jen aperis iu plia neanoncita membro: *Bernado*! Ni atingis la nombron de 17 adoltoj.

Tiu muzeo, unue organizita de folkloro dancgrupo, estas trezorejo, kaj estus tro longe rakonti ĉion. Ni aprezis la afablecon de la juna gvidantino. Post la esploro de pluraj ĉambroj kaj de la vasta fojnejo, nun eksponejo, ni revenis en la kuirejon, kiu bonodoris. La panoj ankoraŭ varmaj estis ĵus bakitaj, kaj ni povis aĉeti da ili.

Poste okazis iom da konfuzo por iri al la sekva rendevuo, ĉar unue venas la demando *"Kiu prenas kiun en la veturilo?..."*. Estis dirita al mi, kiujn personojn mi prenos en mian aŭtomobilon, sed ne estis dirita, kiun veturilon mi devas sekvi. Mi unue pensis sekvi la ruĝan de Simone, sed ŝi ne rajtis preni ĝin pro manko de kontrolo post la akcidento; mi pensis sekvi alian ruĝan, sed ankaŭ ĝi restis sur la parkejo (la ŝoforo elektintis vojaĝi kun aliuloj). Poste mi konstatis, ke ĉiuj veturiloj estis foririntaj, kaj mi startis malfrue.

Pro tio mi perdiĝis plurfoje (feliĉe la personoj, kiuj estis kun mi, konservis serenecon) kaj ni alvenis ĉe la monaĥejo de *Lusse* 25 minutojn post la aliuloj.

Kia surprizo, kiam mi finfine alvenis en la monaĥejo ! *Jean-Marc* (en budismo, li estas *Lamao Sultrim*) bonvenigis nin, kaj enirigis nin en grandan salonon. Tie grandega nombro da homoj ĉetabliĝis, kaj ne nur miaj esperantistoj. Ĉiuj homoj manĝis fratece en bela familia etoso. Mi kredis min en alpa rifuĝejo por marŝantoj. *Jean-marc* afable pretigintis telerojn por ĉiuj el ni, kvankam ni havis nian piknikon. *"Mi ne komprenas, diris Jean-Marc, mi preparis 17 telerojn kaj tio ne sufiĉas, kial ?..."*

- Ne gravas, mi ne bezonas teleron, mi havas sandviĉojn !"

Nur poste mi komprenis. Unu plia esperantistino, kiu ne estis certa veni, veturintis rekte al la monaĥejo. Ni do estis 18, eĉ 19, se mi kalkulas la ĉarman bebon Julia, kiu jen dormis jen ridetis al ni.

Jean-Marc proponis al mi seĝon apud *Ursula* kaj si. Ni havis agrablan konversacion. *Jean-Marc* eĉ sukcesis diri kelkajn frazojn en Esperanto. Tio konsolis min, ke restis malmulte da tempo por manĝi; preskaŭ ĉiuj estis ĉe la deserto.



Post la manĝo, mi konstatis, ke la fideluloj de tiu monaĥejo jam estis ordigantaj la glasojn, telerojn, tablojn, ktp... Mi admiris la belan organizon.

Poste Jean-Marc okupiĝis nur pri nia grupo, vizitigis al ni la "templon", kaj klarigis al ni multe pri budismo. Mi interpretis al Esperanto. Jean-Marc iom konas esperanton, sed ne sufiĉe por klarigi ĉion en la lingvo.

Estis planite, ke je la dekkvina ĉiuj, kiuj dezirus povus fari meditadojn kun la du monaĥoj, aŭ povus elekti promeni piede en la apudaĵo. "La unua parto de la meditado daŭros 25 minutojn" diris Jean-Marc. Kelkaj el ni partoprenis ĝin. Mi mem ĉeestis la Kommunar meditations, kaj tre ŝatis tion. Poste ĉiuj retroviĝis sur la parkejo de la monaĥejo kaj povis aŭ adiaŭi aŭ fari alian parton de la programo: la vizito al la "festivalo de geografio" de Saint-Dié.

Post emociigaj adiaŭoj, grupo pluiris ĝis Saint-Dié, sed sen devigo sekvi la saman programon, ĉar la programeroj estis ege riĉaj. Do estis planite, ke ni vagos libere.



Ankaŭ tiu parto ne estis banalaĵo. La festivalo de geografio de Saint-Dié estas giganta afero, kiu de 8 jaroj venigas 40 000 vizitantojn, kun tre ambicia altnivela programo de prelegoj, filmoj, diskutoj, dancoj kaj muzikoj sur stratoj, marionetoj, prezentadoj de kuir-arto. Ĉi-jare la ĉefa temo estis Ĉinujo, sed ne nur Ĉinujo kuŝis en la programo.

Mi decidis iri spekti la filmon pri *Elisée Reclus* (mi antaŭ-studentis la programon). Mi sciis, ke li estis subtenanto de Esperanto. Mi ne estis elrevigita. La filmo estis emociiga kaj ricevis multajn aplaŭdojn; sekvis debatoj.

Mi aŭdacis diri publike, ke mi tre ŝatis la filmon, unue ĉar la homo Elisée Reclus estas interesa geografiisto, due ĉar li subtenis Esperanton, kiu estas mia fako. Unu el la aŭtoroj de la filmo respondis: "Eĉ antaŭ la invento de Esperanto, Elisée Reclus jam sopiris pri internacia lingvo; li estis avangarda. Ĉu li estus kontenta pri Wikipedia, se li ankoraŭ vivus?" La debatoj poste iris en alian direkton.

En nokto kaj pluvo mi revenis ĉe mi. Tio ne estis tre facila, sed mi estis tiom ĝoja pro tiu agrabla sukcesa amika tago, kaj mi opinias, ke ĉiuj estis same kontentaj kiel mi!

Imagu !... mi atendis 12 personojn, kaj venis 19 !




Foto far Nadar

Ginette MARTIN

NB el la redaktejo - *cele pravigo de la interveno de Ginette:*

Elisée RECLUS - 1830 / 1905 = Fama geografo, aŭtoro de la "Nova Geografio Universala", 19 volumoj, 17 873 paĝoj, 4290 kartoj, miloj da gravuraĵoj ... kaj "L'homme et la Terre" ("La Homo kaj la Tero") 6 volumoj ... Temas pri vasta, historia fresko de la homaro, de ĝiaj luktoj, de ĝiaj progresoj, ek de la prahistorio ĝis la komenco de la XXa jarcento.



(elvoko de lia opinio pri internacia lingvo -li emfazas pri Esperanto! - paĝoj 457 / 458). Elĉerpaĵo:

"Kurioza konstato, tiu nova lingvo estas jam vaste uzata, ĝi funkcias kiel organo de la homa penso, dum ĝiaj kontraŭuloj kaj kritikuloj ripetas kiel arda vereco, ke lingvoj estiĝis neniam el artefaritaj kreaĵoj, sed devas naskiĝi el la vivo mem de la popoloj kaj el ilia intima genio.

Kio veras, estas ja, ke ĉiuj radikoj de ĉiu idiomo venas el praa fonto, kaj Esperanto estas, laŭ ĝia tuta vortaro, nova kaj nekontastebla ekzemplo, sed ties radikoj kapablas nuanciĝi genie laŭ la plej direkta maniero, kiel tio okazis por ĉiuj artoj kaj por ĉiuj sciencoj.

Ĉi-rilate ekzistas nenia escepto: ĉiu fakulo uzas sian propran, teknikan lingvon. La inventisto de Esperanto, kaj tiuj, kiuj en ĉiuj landoj de la mondo alportis al li energian subtenadon, neniel elmontras ambicion anstataŭigi la aktualajn lingvojn, kun ilia longdaŭra pasinteco literatura kaj filozofa; ili proponas sian ilon de komuna harmonio inter nacioj, kiel simplan helpanton de la naciaj idiomoj".

(libera traduko)

La tuta opinio de Elisée Reclus pri la aludita temo estas aŭskultebla (franclingve - profesia "parolanto"), alklakante "livre audio gratuit" (publikigita la 1-an de septembro 2010).

LA 21-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO en Lloret de Mar de la 6-a ĝis la 12-a de oktobro 2013

Kelkaj entuziasmaj katalunaj esperantistoj organizas ĉiujare allogan E-Semajnon ĉe la marbordo de Mediteraneo. Ĉiam ĝi okazas alterne norde kaj sude de Barcelono. Ĉi-foje la bela urbo Lloret de Mar gastigis tiun ĉi eventon. Lloret estas unu el la plej vizitataj turismaj centroj de la “Costa Brava”- Sovagha Marbordo. En la pasinteco ĝi dependis de la konstruado de ŝipoj, fiŝkaptado kaj agrokulturo. La kampojn anstataŭis modernaj hoteloj laŭlonge de la strando. Ni loĝis en la plej granda, en la hotelo “Don Juan” havanta 869 ĉambroj. Ĝi estis plene okupita. Por niaj aktivaĵoj ni disponis pri granda salono.



La aranĝon partoprenis 136 esperantistoj el 15 landoj. Venis pluraj novuloj, kiuj asertis partoprenon denove venontjare. La plej aĝaj estis 95 kaj 97-jara bone parolantaj geesperantistoj el Sant Cugat del Vallés. Tie okazis la unuaj du E-Semajnoj iniciatitaj de s-ino Trini Garcia Corbach. Kun nostalgio ŝi rememoris tiujn eventojn.

La inaŭguran ceremonion ĉeestis la urbestro de Lloret s-ro Romà Codina i Maseras. Li afable bonvenigis nin dezirante sukcesan

restadon. Inter la elstaraj personoj troviĝis Barbara Pietrzak el Pollando, kiu salutis la ĉeestantojn nome de UEA. Tuj posttagmeze ŝi prelegis pri la gazeto “Heroldo de Esperanto” menciante ĝiajn iamajn redaktorojn. Ŝi ĉefe omaĝis kaj substrekis la grandan laboron kaj meriton de Ada Sikorska Fighiera por Esperanto. Barbara ankaŭ iom rakontis pri la E-movado en Pollando kaj ĉefe pri la Pola Ret-radio, kies elsendojn ŝi efike prilaboras kaj prezentas.

De Paŭlo Branco ni eksciis pri la funkciado de Eŭropa Unio. Li, kiel kompetenta persono, pro siaj funkcioj en diversaj institucioj de EU detale priskribis la nuntempan situacion en Bruselo.

Wolfgang Günther en siaj prelegoj “Kulturo de daŭropoveco” parolis pri la neceso de malpliigo de produktado kaj konsumado por pli digna vivo de ĉiuj. Krom aliaj gravaj punktoj li atentigis pri klimatsanĝiĝo kaj ties malbonaj konsekvencoj por estontaj generacioj.





De la geedza paro Buŝs el Latvio ni eksciis pri la fama litova pentristo kaj komponisto Mikolajus Konstantinas Ĉiurlionis. Ilia dua prelego temis pri la tri Baltaj landoj. Samtempe ili invitis partopreni la 50-an jubilean BET (Baltiaj E-Tagoj) okazonta venontjare en Latvio. Nia kara organizanto, la poeto kaj pensemulo Luis Serano Pérez dediĉis sian ampleksan prelegon al “La Agrokulturo”. Temis pri influo de agrokulturo al la homa vivo ekde la pratempo ĝis nun. Li emfazis la fakton, ke sen agrokulturo ne povas ekzisti la vivo. En lia interveno kaj debato “Ĉu la E-movado kontentige progresas”

estis iom malfacile konvinki lin pri daŭra progresado malgraŭ tio, ke ne okazas tiom da klubaj aktivaĵoj kiom en la pasinteco. La moderna epoko alportas novajn rimedojn, eventojn kaj aliajn aktivaĵojn.

Rodica Todor el Rumanio instruis Esperanton al la partoprenantoj de diversnivelaj scioj. En la E-kurso fluparolantoj plenumis donitajn taskojn dum ŝi okupiĝis pri komencantoj. Rodica kuraĝigis kaj lerte gvidis ilin al progreso. Kun granda entuziasmo ŝi sukcesis kontentigi ĉiujn grupojn.



La premio de Ada Sikorska Fighiera estis ĉi-foje atribuita al



s-ino Alicja Lewanderska-Quednau pro ŝia efika laboro por Esperanto. Kiel kutime okazis ekskursoj. Ŝipe ni direktiĝis al la proksima urbeto Tossa de Mar, kie ni supreniris (kelkaj - per urba trajneto - aliaj piede) al kastelo por ĝui belan panoramon.

Restis tempo por promeno tra stratoj kaj k a f u m a d o . Dum alia duontaga ekskurso ni vizi-



tis la maran muzeon en Lloret kaj ekkonis ĝian historion. La tuttaga ekskurso estis tre aprezata. Ĝi gvidis nin al Girona, kie ni vizitis la malnovan kvartalon, vidis la katedralon kaj poste ni daŭrigis tra montareca pejzaĝo ĝis la ĉemara urbeto Cadaqués. Iuj el ni promenis ĝis la urbeto Portlligat por vidi la domo-muzeon de la fama pentristo Salvador Dalí.

Dum vesperaj programeroj ni dufoje “interkonatiĝis” ĉe vin-trinkado. Ŝercoj, kantoj kaj poemoj animis tiujn vesperojn. En alia vespero la edzino de Luis, Maria Ferigle, per DVD prezentis la operon “La Traviata”. Ne mankis folklor- vespero kun havanaj kantoj de la jam konata ensemblo “Montjuit” kaj la fama trinkaĵo “Cremat”, per kiu finiĝis en gaja kaj neforgesebla etoso la 21-a E-Semajno.



Spite al la lingvolimo, komunaj sentoj per Esperanto

Ĉi-aŭtune, la ĉe-rejna urbo SPEYER estis franc-germana renkontiĝejo semajnfina

Lingvolimoj dividas, sed Esperanto ligas. Tion denove spertis la vizitantoj de la **35a BAVELO-Seminario** en la urbo Speyer, de la 18a ĝis la 20a de oktobro.

La supera parto de la rivero Rejno estas lingvolimo kaj ankaŭ ŝtatolimo inter Francio kaj Germanio. Sed regas amikaj rilatoj inter la esperanto-parolantoj, kiuj loĝas ambaŭflanke de tiu traeŭropa riverego. Tiel, dank' al esperanto, ekestas komuna sento eŭropunia en tiu regiono de Eŭropa Unio



Franz-Georg Rössler, klera gvidanto, unue ekinformas pri la miriga katedralo, antaŭ interna vizito de la impresoplena verkajo !

Plurfoje en la jaro, la esperanto-amikoj de la limregiono renkontiĝas en komuna aranĝo. Alterne invitas foje la germanoj, foje la francoj. Ĉi-aŭtune germananflanke organizas BAVELO (*Baden-Virtembergia Esperanto-Ligo*), kaj ĉiunprintempe francaflanke gastigas *Esperanto France-Est*, la Esperanto-organizo de Alzaco kaj Loreno. La gaja renkontiĝo, kun variorica programo estas kaj lerniga, kaj distra, kaj turisma

... kaj amikiga !
Esperanto,

inter la proksimume kvardek kunvenintoj, kiuj ja havas diversajn gepatrajn lingvojn, estas la natura komunikilo.

Kiam renkontiĝas ne nur partoprenantoj, kiuj havas komunan gepatran lingvon, esperantlingva konversacio ofte sentiĝas natura, dum en renkontiĝoj de nur unulingva partoprenantaro, esperantlingva konversacio ofte sentiĝas iel "artefarita", nur „ekzerco-cela“. La proksimeco de la lingvolimo ĉi-regione estas do ŝanco por Esperanto. Tiel ankaŭ la komencantoj en ĉi tiu (ĝis nun) nur regiona kunveno, estas provokataj uzi sian ĝermantan esperanto-scion praktike.



Estas iuj el la partoprenantoj, kiuj venis por eknaĝi en la Internacia Lingvo, aliaj venis por perfektigi en ĝi. Dume, esperanto-parolantoj okupiĝis pri tre variorica temaro: pri novaj esperanto-libroj, pri la Esperanto-studado en Poznano, Pollando, pri la motivoj de Katalunio sendependiĝi de Hispanio (foto), pri Tatoeba, la enreta frazvortaro multlingva el Japanio, kaj pri krimrakonto ĉirkaŭ poŝta pak-stacio en Germanio. Rakontis ankaŭ libervola helpanto dum la futbalĉampionado en Brazilo pri siaj travivaĵoj.

Partoprenis du familioj kun malgrandaj infanoj. La gepatroj apartenas al la organizantoj. Ĉar ankaŭ partoprenis studentoj, la aranĝo kunvivigis tiusemajnfine ĉiujn generaciojn, de okmonatulino ĝis pli ol sepdekjaruloj !

La urbo Speyer ofertas riĉajn vidindaĵojn belnaturajn, kulturajn, historiajn kaj teknikajn. Logis multajn je bela vetero la ŝipekskurso sur la Rejno. Aliaj preferis sekvi la profesian urbogvidanton, kiu parolis en flua kaj lerta Esperanto. Unuiĝis la du grupoj por gazeta foto antaŭ la katedralo. Sekvis mallonga, religia meditado en katedrala kapelo Sankta Afra, kaj vizito de la katedralo mem kun ties kriptoj. Vespere vokis la historie vestita urbo-gardisto duonon de la staĝanoj sperti la noktan impreson de Speyer. Ĝuis ĉiu la urbon laŭ sia prefero. Post la oficiala fino eblis elekti viziton, aŭ de la historio, aŭ de la teknika muzeo de Speyer.



En la katedrala kapelo Sankta Afra



LA 25a EŬROPA RENDEVUO 16-17.11.2013

La jubilea evento okazis semajnfine en "Stella-Plage" ĉe la nordfranca markolo en la bela kaj komforta feriejo "Stella Maris". Ĝi estis bone organizita de la geedza paro Arlette kaj Edmond Plutniak. Tridek kilometrojn norde de "Stella-Plage" situas "Boulogne-sur-Mer", la urbo de la unua Esperanto-kongreso. Rendevuis pli ol okdek esperantistoj el ok landoj. La plej multnombraj estis francoj de la norda regiono.

Sabate la 16-an de novembro 2013 post la akcepto de la alvenintoj Arlette prezentis la novan prezidanton de la Nordfrancia E-Federacio Michel Dechy. Ŝi bonvenigis la partoprenantojn kaj skizis la programon, kiu tuj posttagmeze komenciĝis. Oni povis elekti el kvar eblaj programeroj. Katalin Kovats gvidis E-kurson por komencantoj, kiun povis observi ankaŭ instruantoj. Michel Dechy prezentis kaj animis kurson pere de Tinĉjo-albumoj, Anne Jausions prezentis la plej interesajn nuntempajn romanojn kaj Franjo Lévêque kantigis muzik-ŝatantojn kaj gvidis korusan atelieron. Ĉe la fino de la staĝo ili regaligis nin per belaj kantoj.



Katalin disdonis atestilojn al ĉeestantaj esperantistoj, kiuj sukcesis en KER-ekzameno. Tre bone funkciis la libroservo de FEL prizorgata de la belga E-klubo de Gent. Laŭ la propono de Flory Witdoeck el Belgio oni kolektis donacitajn librojn por esperantistoj en Kongolando. En la ferieja restoracio ni bonege manĝis. Vespere ni ĝuis koncerton de Guillaume Armide kaj poste ni babilis en agrabla etoso trinkante cidron, oranĝosukon aŭ bieron.

Sam-temaj programeroj daŭris dimanĉe antaŭtagmeze. Ekde la 11-a horo estis libera tempo. Oni povis trarigardi ekspozicion aranĝitan surloke kaj admiri belajn pentraĵojn de esperantistoj kaj ornamaĵojn el vitro faritajn de Katalin. Kelkaj eksponaĵoj estis aĉeteblaj. Iuj promenis ĝis la plaĝo, aliaj veturis kaj vizitis la najbaran urbon "Le Touquet". Antaŭ la tagmanĝo ni fotiĝis por memori la eventon. Loka ĵurnalistino aperigis artikolon pri la evento en franca ĵurnalo "La voix du Nord".



Posttagmeze la geedzoj Plutniak dankis al ĉiuj kursgvidintoj kaj al la partoprenantoj. Ili gratulis ankaŭ la iniciatinton de tiu-ĉi renkontiĝo s-ro Jean Dietrich, la honor-prezidanton de la Norda Federacio kaj la unuajn gvidintojn gesinjorojn Valet. S-ino France Valet rememorigis ĉiujn staĝojn, kiuj komenciĝis en Morbecque le Parc sub ŝia gvido. Poste estis prezentata sur ekrano la Eŭropa himno, Michel Dechy parolis pri sia entuziasmo rilate al Tinĉjo kaj prezentis la ĵus eldonitan tradukon de la bildlibro: La Templo de l'Suno. Retan Esperanto-ludon RISKO prezentis Katalin, ĝia aŭtorino. Oni eĉ iom provludis por pli bone kompreni ĝin kaj instigi la partoprenantojn al ludado. La koruso fermis tiun mallong-daŭran, sed belan aranĝon. Koran dankon al la organizantoj pro ilia entuziasmo kaj bona por-esperanta laboro!



Liba Gabalda



El nia libroservo

Informoj

Jen verŝajne la lasta "libroservopaĝo de la Informilo", almenaŭ tiuforme. Multajn dankojn al Pol Denis, kiu dum tiel longa tempo prizorgis la regionan revuon kaj akcepteme donacis lokon por la libroservaj informoj. Ni ne forgesos lin !



⇒ la libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon en Stockensohn, la 4/5/6ajn de aprilo 2014.

1



2



3



1) Taglibro de mia frato, historio, **Chava Pressburger**, *Kava Pech* (2005)

158 paĝoj. **24,00€** Taglibro de juda juna ĉeko, kiu mortis en 1944 en nazia koncentrejo, prezentita de lia fratino, kiu pluvivis tiun teruran periodon.

2) Arne la ĉefido, rakonto, **Leif Nordenstorm**, *Kava Pech* (2012), 116 paĝoj. Prezo: **5,40€**

Aventuroj de juna knabo vivanta en Svedujo, en la 9a jaro.

3) Comme un vol d'oiseaux sacrés, romano, **Trevor Seele**, *Kava pech* (2013), 264 p, **15,00€**

Juna aŭstrala aborigeno gvidas rezistan luktadon kontraŭ blankula koloniado. Franclingva traduko de "flugi kiel kakatuoj" plenumita de nia amikino Ginette Martin, kun helpo de deko da kunlaborantoj.

Por mendi librojn :

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉisuban mendilon)

- per e-poŝto al "libroservo.efe@wanadoo.fr"

- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO" **IBAN** : FR 98 20041 01010 0280076H031 97

BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

<i>mendilo:</i>	
Bonvolu sendi tiujn librojn:	al jena adreso:
	S-ro/ino
En	la
	Subskribo:

IF INTERNACIA FESTIVALO

... jarfine al IF

La 30-a kaj (antaŭ-) lasta INTERNACIA FESTIVALO en NÖRDLINGEN 27. 12. 2013 - 3. 1. 2014

Kadra temo: Retrospektivo

Grava Informo

Jam la 3an fojon Nördlingen en Bavario estis la urbo de la Internacia festivalo (IF). Principe ĝi estis la 30a kaj ankaŭ la lasta IF. Tamen post alveno jam aperis la novaĵo. Ĝi estas nur la antaŭ-lasto IF, ĉar HDP ricevis novan proponon de JUFA-domoj (junuloj kaj familioj). Jen kion li skribas:

Karaj geamikoj,
Pluraj demandis, pluraj petis, pluraj sopiras ol plia IF. Jen do: la (ekstervica) 31-a Internacia Festivalo okazos en la urbo Jülich, urbo inter Köln kaj Aachen. JUFA, la aŭstra entrepreno, kiu ankaŭ mastrumas Nördlingen, ĵus inaŭguris la novan domon en Jülich kaj elkore bonvenigas nin! Ĝoju do pri afabla akcepto!
Jam informoj troviĝas en la retejo: <http://internacia-festivalo.de>
Ne hezitu ĝin viziti kaj poste aliĝi.

La jarfina Internacia Festivalo prezentas altkvalitan programon kaj riĉan originan Esperanto-kulturon el pluraj landoj de la mondo. Dumtage ni ĝuas diversajn seriozajn prelegojn, seminariojn kaj aliajn interesajn aktivajn. La vesperaj programeroj estas kutime distraj.



Al la aranĝo aliĝis pli ol 120 geesperantistoj el 22 landoj. Tio estas kuraĝiga atingo por la organizanto. La domo en Nördlingen estas komforta, kvazaŭ hotelo kun bone ekipitaj salonoj, vastaj du-litaj kaj kvar-litaj ĉambroj kun duŝoj kaj necesejoj. La urbo estas konata pro sia aparta situacio en kratero kaŭzita de meteorito falinta antaŭ 15 milionoj da jaroj.

Tial refoje eblis ĝui fakajn prelegojn pri asteroidoj kaj meteoritoj, kiuj tiom abunde atingas la teron kaj viziti la muzeon rilate al tiu temo.

Okaze de la distraj vesperoj la partoprenantoj povis ĝui la koncertojn de la rusa bardo Mikaelo Broŝtejn, de konata kantistino Nataŝa Berce el Svedio kaj de Sergio Straŝnenko el Latvio.

Sed la ĉefa vespero okazis la 31an de decembro, kiam eblis transiri al la nova jaro 2014. Tiam oni ankaŭ salutis la novan jaron rilate al la horzono de la diversaj partoprenantoj, de Novzelando ĝis Brazilo. Post la tradicia silvestra bankedo, la balo estis inaŭgurita per polonezo.

La tuttaga ekskurso celis la urbon Rothenburg, tre turisma urbo kun multaj vendejoj. Ĝi troviĝas sur la "Romantika Strato". Dum la tuta jaro eblas aĉeti tie Kristnasko-ornamaĵojn.



La festivalo estis bone organizita de nia kara HDP (Hans-Dieter Platz) kaj tre verŝajne multaj deziros partopreni la lastan IF-on en Jülich por adiaŭi al tiu simpatia kaj internacia renkontiĝo.

Andreo



[VIDÉOS. L'espéranto, une langue bien vivante](#)

Le Point.fr - Publié le 02/11/2013 à 10:36

Langue entièrement construite et inventée au XIXe siècle, l'espéranto s'apprend toujours et se pratique au quotidien.



Cours d'espéranto en août 2013 au château de Gresillon à Saint-Martin-d'Arce. © FRANK PERRY / AFP

La première fois que l'on entend parler espéranto, on ressent de l'étonnement. Tout d'abord, cette langue ne ressemble à rien de connu, mais d'un seul coup il nous semble pouvoir saisir un mot, puis un autre, puis plus rien de nouveau. L'explication est très simple : l'espéranto est composé à 70 % de racines latines, ce qui le rapproche des langues indo-européennes.

Il est également insolite, passé le premier étonnement, de se dire que nous écoutons une langue créée en intégralité par une seule personne. Cet inventeur, c'est Ludwik Lejzer Zamenhof, un médecin polonais qui a mis au point ce qu'il appelle la "Langue internationale" en 1887. Son but ? Créer une langue facile à apprendre pour permettre la compréhension et l'égalité culturelle entre des personnes s'exprimant dans des langues différentes. La grammaire est simplifiée et c'est une langue dite "agglutinante", c'est-à-dire qu'une grande part du vocabulaire est composée d'un même radical où se combinent des affixes et des suffixes, ce qui réduit le volume de mots à mémoriser.

"L'espéranto, c'est une langue construite exprès pour être beaucoup moins difficile que les langues naturelles. C'est d'abord un idéal de paix", assure Michèle Abada-Simon, professeure d'espéranto au sein de l'association [Espéranto-France](#). Une utopie ? Une vaine tentative de construire un monde idéal sans tour de Babel ? Peut-être. Mais aujourd'hui on estime le nombre de locuteurs entre 100 000 et 10 millions (on retient souvent le chiffre de 2 millions), répartis dans 120 pays. Preuve que l'espéranto fonctionne et ce malgré les diverses persécutions qu'ont subies ceux qui la parlent,



notamment sous les dictatures européennes. Ainsi, [Staline](#) a envoyé 30 000 espérantistes au Goulag de 1936 à 1955, considérant l'espéranto comme une langue internationale bourgeoise permettant l'espionnage, après avoir un temps pensé à l'utiliser pour répandre le communisme.

Comment apprendre l'espéranto aujourd'hui ? Des méthodes gratuites d'apprentissage sont disponibles sur Internet. Il est également possible de suivre des cours avec un professeur en chair et en os, tels que

ceux dispensés par l'association Espéranto-France. Nous avons assisté au premier cours des débutants, où pendant deux heures, les élèves ont noué leurs premiers contacts avec la langue. Après les cours, les personnes qui souhaitent pratiquer l'espéranto plus régulièrement se retrouvent lors de cafés-conversations. Attention, interdit de "crocodiler" (quand deux espérantistes parlent leur langue natale au lieu de l'espéranto) !

D'autres vont encore plus loin et n'hésitent pas à le pratiquer quotidiennement en famille, à l'instar de Bertrand Hugon. Ce passionné d'espéranto a rencontré sa femme Valentina, russe et espérantiste également, lors d'un congrès... d'espéranto ! Il y a sept ans, leurs fils Ivan est né de leur union. Après discussion, la décision a été prise que Bertrand lui parlerait en espéranto et Valentina en russe. Les deux parents eux communiquent en espéranto. Cependant, parfois, le français refait son apparition... Bertrand met en avant la valeur dite "propédeutique" de l'espéranto, c'est-à-dire que son apprentissage facilite l'apprentissage ultérieur d'autres langues. Chose qui plaît à Ivan, qui dit aimer "parler beaucoup de langues".

REGARDEZ notre reportage sur les cours et les cafés-conversations en espéranto :

L'espéranto matin, midi et soir

Daniel LUEZ (naskiĝis la [27-an de decembro 1924](#) en [Guise, Francio](#), mortis la [5-an de novembro 2013](#) en [Laon](#)). Li esperantistiĝis en [1947](#), kaj en [1955](#) li kreis la [Koresponda-n Servo-n Mondskala-n \(KSM\)](#), kiu poste fariĝis servo de [UEA](#). Li partoprenis en la [kabareto "La tri koboldoj"](#), kun [Raymond Schwartz](#). Pro la traduko de la novelo [Dialogo ĉe l' subiranta suno](#) de [Pierre Louys](#), li ricevis siatempe de la tiam [UFE](#) (nuna [Espéranto-France](#)) la unuan premion pri tradukado. Li ankaŭ redaktis inter la jaroj [1988](#) kaj [1992](#) la literaturan revuon [Fonto](#).


Krom kelkaj noveloj, kiuj aperis en la revuo "[La Ondo de Esperanto](#)", kun kiu li kunlaboris, Daniel Luez famiĝis pro tradukoj:

- *Angelo, tirano de Padovo* de [Victor Hugo](#)
- *Sinjoro Jokasto kaj aliaj noveloj*, aro de tradukitaj noveloj de [Guy de Maupassant](#), kiuj aperis ankaŭ en "[Fonto](#)", kies ĉefredaktoro li estis dum 5 jaroj.
- **Kvin romanoj de [Georges Simenon](#)**: *Maigret hezitas, Maigret kaj la maljuna damo, Amiko el la junaĝo de Maigret, La flava hundo* (ankaŭ pri la fama komisaro [Maigret](#)), *Maigret eraras*.

Büawasprìng Knabaj petolajoj

Dulingva (elzasa/Esperanto) poemaro de la elzasa
poeto Gérard LESER .
Traduko de Edmond LUDWIG

Mendebla por 1 eŭro ĉe la tradukisto
ESPERANTO
26, route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR



Hejme lerni Esperanton per la reto kaj skajpo.

Bernard Behra informas nin :

Al kurso pri skribado kaj parolado en Esperanto kun instruisto en Interreto mi aliĝis en oktobro 2013. La kursojn gvidas Maria Majerczak, universitata instruistino (*Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando*).

La kurso celas esperantistojn kun meza aŭ alta nivelo de la lingvokono, redaktantoj de bultenoj, retpaĝoj, al verkantoj, e-instruantoj kaj ĉiujn, kiuj deziras plibonigi diversajn aspektojn de sia lingvokono. Ĉiusemajne la partoprenantoj verkas mallongan tekston. La tekstoj estas korektataj dum la lecionoj. La necesaj vortoj kaj reguloj estas studataj.

Dum la leciono ĉiu lernanto estas antaŭ sia komputilo kvazaŭ en klasĉambro. La ekrano estas la tabulo, sur kiu la instruistino kaj la lernantoj povas skribi, ĉiuj povas legi samtempe kaj oni povas kune paroli, fari demandojn, ricevi eksplikojn, ekzerci la prononcon, ktp. Eblus vidi unu la aliajn, sed pri tio la instruistino rezignis por ricevi la tutan atenton de la lernantojn nur por la skribo kaj la parolo.

Mi estas kontenta pri tiu sperto, kaj mi multe lernas. La lecionoj estas praktikaj kaj altnivelaj. Oni laboras sur siaj propraj tekstoj kaj paroloj. La instruistino estas ege kompetenta en diversaj fakoj pri lingvistiko kaj lernado de lingvoj. Tamen ŝi atente adaptiĝas al la nivelo de ĉiu partoprenanto kaj eltiras el ĉiu skriba kaj/aŭ parola esprimo elementojn por instrui nin. La kurso povus ŝajni kvazaŭ puzlo. Ĉe la fino de la sesmonata kurso (du horoj kaj duono ĉiuvendrede) mi certas, ke la atingo estos pli bona posedo de Esperanto. La kurso estas ankaŭ interesa por mi, ĉar mi lernas pli bone uzi la komputilon por pli bona komunikado.

Tri kursoj laŭ tiu tipo nun funkcias kun Maria Majerczak kiel instruistino. Se tio interesas vin, [informiĝu ĉe](#) :

<https://docs.google.com/document/d/11tZd-r470uOjg1I5lwmkf9rkCwD-Ys5Tu7s8WctPTwQ/preview>

aŭ kontaktu Maria Majerczak : [esperanto.instruado.jag.univ.pl\(ĉe\)gmail\(punkto\)com](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(ĉe)gmail(punkto)com)
aŭ ĉe mi [bernard.behra\(ĉe\)wanadoo\(punkto\)fr](mailto:bernard.behra(ĉe)wanadoo(punkto)fr).



Invito al **PRINTEMPas**, intensivaj kursoj kun Radojica Petrović kaj Christophe Chazarein kaj internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1).

De 26a de aprilo ĝis 4a de majo 2014 en la franca Esperanto-kastelo Greziljono. Retejo:

<http://gresillon.org/printempo>

Kontakto: kastelo@gresillon.org, +33-2.41.89.10.34, Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ, France.

Invitation à **PRINTEMPas**, cours intensifs avec Radojica Petrović et Christophe Chazarein et examen international d'espéranto CECR (B1, B2, C1).

Du 26 avril au 4 mai 2014 au château espérantiste de Grésillon. Site: <http://gresillon.org/printemps>

Contact: kastelo@gresillon.org, 02.41.89.10.34, Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ.

Lasta letero al Pol

Saluton Pol,

Mi planis baldaŭ sendi al vi miajn kontribuaĵojn por la numero 164. Sed jen kun granda ĉagreno mi eksciis, ke vi subite foriris. Tiu novaĵo estis preskaŭ nekredebla, ĉar 3 tagojn antaŭe ni ankoraŭ interŝanĝis mesaĝojn kaj vi eĉ pagis viajn kotizojn 2014 kaj aliĝon al nia printempa staĝo. Certe vi ne planis tiom frue forlasi nin. Fakte vi ne nur foriris, sed tute foriris kaj lasas al ni gravan heredajon. **LA INFORMILO**, kiun vi sukcesis eldoni kaj dissendi dum preskaŭ 41 jaroj. Intertempe mi ricevis de via filino la dokumentojn, kiujn vi jam pretigis por tiu numero 164. Certe tiu numero devos nepre aperi. Kun Edmond ni klopodos ĝin eldoni laŭ niaj eblecoj.

Tre verŝajne ĉiuj konscias, ke vi faris mirindan laboron kaj mi ofte aŭdis, ke nia regiona bulteno **LA INFORMILO** estas la plej bela regiona bulteno en Francio, despli ke lastatempe vi sukcesis ĝin eldoni kolore. Tial ni havis abonantojn ne nur en orienta Francio, sed ankaŭ en aliaj regionoj kaj eĉ en eksterlando

Saluton Pol kaj dankon pro viaj longjaraj kontribuoj al Esperanto en nia regiono kaj tra la mondo.

Andreo

Karaj abonantoj kaj membroj,

Pluraj el vi jam pagis siajn kotizon kaj abonon al nia bulteno **LA INFORMILO** por 2014. Mi jam notis abonojn por la jaroj 2015 kaj 2016. Eĉ lastatempe ankoraŭ alvenis abon-pagoj. Ŝajne multaj el vi esperas ricevi pliajn numerojn en 2014. Aliflanke necesas ankaŭ konstati, ke la nombro da abonantoj iom post iom kaj daŭre malkreskas. La kaŭzoj povas esti diversaj. Eblas nun informi pli rapide per la reto, per dissendolistoj, per mesaĝoj. Tamen multaj ŝatas ricevi informojn paperforme. Sed neniu estas preta transpreni la tutan kaj ampleksan laboron, kiun faris Pol.

Ĉu ni trovu mezan vojon? Tial mi ŝatus proponi al vi eldoni pli modestan bultenon, nur kiam la informoj ekzistas. Eble tiam ĝi malpli regule aperos, sed tio dependos ankaŭ de viaj kontribuoj. Ĉu ni provu?

Mi estas preta ricevi dokumentojn en formatoj pdf, doc, docx, odt, pub kaj bildojn en jpg, gif, png.

En ĉi-tiu numero aperas la kotizoj kaj abonoj sen ŝanĝo kompare kun 2013. Fakte ĉi-tiu numero estas ankoraŭ la numero de Pol.

Poste eblos proponi ricevi la bultenon per la reto aŭ paperforme. Ĉu tiam la abono restos je 15 eŭroj? Tion ni povos kalkuli fine de 2014 kaj iel trovi solvon por transigi la troan pagon al la posta jaro aŭ eĉ repagi la troajn pagojn.

Jen miaj modestaj proponoj. La sukceso dependos de viaj kontribuoj kaj de viaj abonpagoj.

Andreo
André Grossmann
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

*Feliĉan kaj sano-plenan
novan jaron 2014*



ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2014 ĝIS 2016

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevitaĵoj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevitaĵoj en 2013 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2014.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2013, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Krome vi povas elekti inter la 3 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.


		Jaroj:	2014	2015	2016	
		Abono por adresoj en Francio:	15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj	
		Abono por adresoj ekster Francio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj	
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj	
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj por UFE membro:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj	
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj	
UEA	MG	<ul style="list-style-type: none"> • Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado. • Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago). 				11 eŭroj
	MJ(-T)					26 eŭroj
	MA(-T)					63 eŭroj
Pag-manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:					
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2014, 2015					
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)					
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)					

J A R K O L E K T O D E T A K E 2 0 1 3

JARKOLEKTO de TAKE 2013 estas belaspekta libreto en formato A5 kun 80 paĝoj. Ĝin redaktis Pierre Grollemund el Francio. Ses aŭtoroj kontribuis per artikoloj por tiu teknika verkaĵo. Ĝin ricevis ĉiuj membroj de TAKE. Ĝi estas ankaŭ aparte aki-rebla por 6 eŭroj (sendkostoj inkluzivitaj).

Nia propono: se vi pagas 12 eŭrojn, vi ricevos la JARKOLEKTON de TAKE 2013 kaj estos membro de TAKE por la jaro 2014.

ENHAVO	Ŝermera polder- muelejo
Muzeo de la kunfluejoj en Liono (Francio) Pierre	Pumpi aŭ droni.
Enbetonaj fiksiloj Rémy Bouchet (FR)	Muelejoj en Nederlando Mirakloj de antikva tekniko
Enbetona kaj enŝtala najlado Rémy Bouchet (FR)	Arkitekturo Bronislav ĈUPIN (Rusio)
Historiaj ĉevroj Jan Werner (CZ)	La defio de la frosto en Finnlando Saliko
Grezijonaj laboroj Pierre Grollemund (FR)	Ses monatoj sur tri kontinentoj Maria Moglia Moglia. Tradukis Pierre Grollemund
Teknika Vortaro de Grezijono Pierre Grollemund	Virinoj kaj konstruado Pierre Grollemund



Nos cotisations 2014

Vous venez de recevoir le dernier numéro de notre bulletin trimestriel, **LA INFORMILO** pour la période 2013. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement pour 2014 (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 2014 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Nous espérons ainsi vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT ?

1. Association Régionale ESPÉRANTO FRANCE-EST :

La cotisation à notre Association Régionale ainsi que l'abonnement à **LA INFORMILO** sont à payer:

- de préférence par virement postal à **Esperanto France-Est CCP 1997 72 W NANCY** n'oubliez pas de mentionner sur la ligne de message le but de votre paiement et si possible votre code-adresse. *Ex. Abono Inf + kotizo 2014 por 756*
- par chèque bancaire à l'ordre de **Esperanto France-Est**, mais adressé à notre trésorier:
S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse.

- Nova**
- Une cotisation fédérale de 20 euros vous est proposée. Elle permet de déduire 66% des impôts. Ainsi vous n'aurez payé que $20 - 66\% = 6,80$ euros, mais notre association aura reçu 20 euros.

Abonnement et cotisation pour les années:	2014	2015	2016
Abonnement à La INFORMILO adresse en France	15 €	15 €	15 €
adresse à l'étranger	18 €	18 €	18 €
Adhésion à l'Association Esperanto France-Est (à rajouter à l'abonnement)			
• <i>Cotisation fédérale</i>	7 €	7 €	7 €
• <i>Cotisation fédérale de soutien avec reçu fiscal pour bénéficiaire de 66% de réduction d'impôt</i>	20 €	20 €	20 €
• <i>Même cotisation pour les membre de UFE</i>	16 €	16 €	16 €

2. Association Internationale UEA (cotisations 2014)

Les cotisations à l'UEA peuvent être payées directement à notre association **Esperanto France-Est** par l'intermédiaire de notre trésorier S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM qui transmettra dans les meilleurs délais.

Veuillez noter le code de la cotisation que vous payez. (cotisation UEA MA)

UEA	• Membre individuel reçoit le petit guide de l'UEA	MG	11 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA	MJ	26 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30 ans)	MJ-T	26 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA + la revue mensuelle ESPERANTO	MA	63 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	MA-T	63 €

3. Association Nationale Esperanto-France (UFE) (cotisations 2014)

Les cotisations à l'UFE sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 85535D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 2013 de l'UFE. **Votre adhésion à notre Association Régionale est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.**

Par contre l'abonnement à LA INFORMILO est à payer à notre Association Régionale, mais jamais à l'UFE.

UFE	• Membre actif d'Espéranto-France (avec reçu fiscal)	39 €
	• Membre actif d'Espéranto-France et d'Espéranto-Jeunes. (moins de 30 ans au 1.1.2014)	30 €
	• Tarif réduit pour étudiants, chômeurs	15 €
	• Première année	10 €
	• Cotisation pour un couple (avec reçu fiscal)	78 €
Abonnement au magazine bimestriel Le Monde de l'espéranto .		+18 €

IMPORTANT

- 1) Les nouveaux adhérents à l'Association Régionale, recevront par courrier séparé leur carte de membre ainsi qu'un exemplaire des statuts de l'Association.
- 2) Les cartes de membre de l'année 2014 et éventuellement de l'année 2015 seront envoyés aux autres membres d'**ESPERANTO FRANCE-EST** par courrier séparé avec des informations spécifiques réservées aux membres.
- 3) Les membres payant une cotisation fédérale de soutien ou un don en 2013 recevront un reçu fiscal pour bénéficier de 66% de réduction d'impôt pour la déclaration à faire en 2014.



Ni provu rideti !



Iu studentino trapasas ekzamenon cele ricevon stir-legitimilon...

"Fraŭlino, ĉu vi povas doni al mi la nomon de tiu ilo, kiu ripozas ekstere malsupre, ĉe la antaŭglaco, kaj al kio ĝi utilas ?

Temas pri vitro-viŝilo, sinjoro

...



Suspekto estas pridemandata dum juĝ-sesio...

"Nu, vi pretendas esti senkulpa, revolveron tamen vi posedis !

Estimata prezidanto, estimataj jurianoj, vi ĉiuj posedas ion, kiu ebligas al vi elfari pudoratencon, tamen al neniu venus ideo kulpigi vin pri tia fi-ago !"

Ĵus okazis konkurso de la *"Plej bona dommastrino de la jaro 2013"*.

La prezidanto de la ĵuri-anaro alparolas la premiitan ulinon...

"Gratulon, sinjorino ! Post pridiskuto far la ĵuri-skipo, vi rajtas supreniri la podion ! Ĉu eblas scii, kiel reagis via edzo, kiam vi anoncis al li la ĝojigan novaĵon ?

Li tiom surpriziĝis, ke teleroj ĵus lavitaj kaj sekigitaj falis grunden... kaj tio okazis tuj post kiam li estis puriginta la ĉambrojn per la pulvo-sučilo, gladiginta siajn ĉemizojn, redoninta purecon al la fenestro-vitroj, nu kiel li kutimas fari ĉiusemajne, antaŭ ol fine pleniĝi la lav-maŝinon ..."



Armando kaj Antonino vizitas ĉiujare regionan, plenaeran ekspozicion, kaj ĉiufoje la edzo esprimas ardan dezi-ron ...

"Vere plezurigis min eta flugo per helikoptero !

- Mi ja scias Armando, sed imagu, tia flugo kostas 50 €!. .Kaj 50 € estas 50 €!."

La sekvantan jaron jen denove la patro por la vizito.

"Antonino, mi estas 85-jaraĝa, jen eble mia lasta ŝanco ĝui la etan flugon per hel ...

- Nu, jen denove via gurda deziro !

Memoru, ke tio kostus 50 € kaj 50 € estas 50 €!... "

La piloto, kiu aŭdis ilian konversacion:

"Jen propono; vi eniru ambaŭ la aparaton, kaj tio senpage, kondiĉe, ke vi silentu dum la tuta flugo ! Nur unika vorto nuligus mian proponon, kaj vi ŝuldu 50 €!."

Entuziasmigitaj, la du maljunuloj instaligas malantaŭe ...

La piloto efektivas multajn akrobataĵojn, sed granda silento regas malantaŭe...

Je la alteriĝo, li alparolas Armandon, kiu eliras la unua:

"Mirinde ! Mi estas vere impresita !Neniu vorto dum mia iom timiga flugo !



En kristana familio oni deziras bone eduki la sepjaran filon, kaj je la fino de ĉiu manĝo, Karlo-Eduardo levigas, krucosignas sin kaj diras *"Dankon Dio mia, pro tiu frandinda manĝo, kiun vi donacis al ni !"*

Tiun-ĉi tagon, post la kutima danko, li kurioze aldonas... *"Adiaŭ Avĉjo !"*

La patro ne komprenas, kaj kontentiĝas silenti ...

Postan tagon, tute neatendite, la avo viktimiĝas je subita korkrizo kaj mortas !.

Unu monaton poste, je la fino de la familia vespermanĝo, la knabo stariĝas, krucosignas sin kaj eldiras *"Dankon Dio mia, pro ..."* kaj strange aldonas *"Adiaŭ Avinjo !"*.

La morgaŭon, malsuprenirante la ŝtuparon de sia ĉambro, falas la avinjo kaj bedaŭrinde forpasas ...

"Diven-arton ĝuas mia filo, diras la patro, ni ne plu pretigos komunan, familian tablon !"

Tamen, plurajn monatojn poste okazas familia festmanĝo. Denove, je la fino de la ĉetabla evento, Karlo-Eduardo dediĉas la dankon al Dio, kaj tute neatendite aldonas ...

"Adiaŭ Paĉjo !"...

Memkompreneble ekstrema la patro, kiu silentas kaj provas kvietiĝi .

La sekvantan tagon, piedirante al sia laborejo, je ĉiu strat-transiro, li atente rigardas dekstren, maldekstren.

Feliĉe, nenio okazas, kaj vespere, je sia hejmen-alveno, li ĝoje ekkrias:

" Monika, kiel fartas mia amata karulino ĉivespere ?"...

La edzino malrapide aperas, tute palega, livida ...

"Sed, sed kio do okazas ? scivole informiĝas la surprizita edzo ...

- Vi ne povas imagi ! Tagmeze, tuj post kiam li estis doninta al mi la kurieron, la leteportisto subite falis je miaj piedoj, mortinta !"

NB - Tiun anekdoton ni ŝuldas al nia samideano Robert COLIN (88)



Alvoko el Hiroŝimo por la Internacia Virina Tago 2014

La municipo de Hiroŝimo (1 171 640 loĝ.) kun 23 socialaj organizaĵoj de la urbo kaj de ties prefektejo (2 840 653 loĝ.), ĉefe virinaj, vokas al sendo de solidaraj, kuraĝigaj kaj subtenaj mesaĝoj en rilato kun la katastrofo de Fukuŝimo kaj ties sekvoj.

La lingvo de interŝanĝoj estas Esperanto. La mesaĝoj estos ekspoziciitaj la 8an de marto kun japanlingva traduko en la salono, kie okazos kunveno por la Internacia Virina Tago kaj antaŭe en du salonoj de la urbo.

Personoj, decid-povuloj, organizaĵoj aŭ asembleoj (municipoj, konsilioj, ktp) sen praktika kono de Esperanto, kiuj deziras tamen partopreni en tiu subteno, povas peti de Esperanto-parolanto, grupo aŭ asocio, helpon por traduko de la nacia lingvo al Esperanto. Inverse, Esperanto-parolantoj aŭ grupoj povas sugesti partoprenon kaj proponi sian servon por helpi al traduko. Redaktado de mesaĝo(j) estas ankaŭ ebla kadre de kurso, individue aŭ kolektive. Ankaŭ la viroj povas partopreni.

La temo:

“En kiu situacio troviĝas la infanoj tri jarojn post la katastrofo de Fukuŝimo? Kian estontecon ni transdonu al la infanoj?”

Eltiraĵo:

La registaro diris, ke *“La malpurigo pro radioaktivaj substancoj ellasitaj de la akcidento de atomcentralo kaŭzis la plej seriozajn kaj malbonajn problemojn el ĉiuj malpurigoj de la medio”*.

Kaj ankoraŭ nun la infanoj en Fukuŝimo ne povas ludi libere eksterdome.

Ili vivas kun timo pri kio estas tuŝebla, manĝebla, kaj eĉ spirebla.... Kaj pli granda timo estas interna alradiado.

La teksto de la mesaĝo ne devas superi unu paĝon en formato A4 (21x29, 7 cm).

La instrukcioj pri sendo de mesaĝoj aperas ĝis nun en Esperanto, la japana kaj la franca:

- (EO) — Alvoko el Hiroŝimo por la Internacia Virina Tago
- (JP) — [2014国際女性デーひろしま 連帯のメッセージ](#)
- (FR) — Appel d'Hiroshima pour la Journée Internationale de la Femme 2014

Origino de la alvoko:

La Hiroŝima Esperanto-Centro komencis dissendi alvokojn al internacia esprimo de solidareco kaj subteno unuafoje okaze de la Internacia Virina Tago ekde la jaro 2001 kun 7 aliaj socialaj organizaĵoj (ĉi jare 23). Iom post iom aldoniĝis socialaj organizaĵoj, ne nur virinaj, ne nur el Hiroŝimo mem, sed ankaŭ el ties prefektejo. La municipo komencis partopreni kaj subteni la iniciaton ekde 2004. Internacia alvoko ne okazis en tiu jaro, ĉar la kunveno estis dediĉita al s-ino Hiratuka Raityo, pioniro de la virina movado en Japanio.



Distra Anguleto


Dankon al nia kutima kontribuanto

Joël GRANDJEAN

Krucvortenigmo

HORIZONTALA

VERTIKALE



1. Veturil' kun surtirebla tegmento.
2. Malagrabla subita.
3. Tropika grimpanta plant'.
Person' havanta emon al io.
4. Rusia river'. INVERSE: mezurunuo por brul-ligno.
5. Ĉambr' destinata al intelekta laboro.
6. Difinita cikonstanco. INV: sovaĝa bovo.
7. Akvuma maŝin'. INV: plata fiŝo.
8. Sufikso. Numeralo.
9. Scienco.

1. Ujeg' por funkciigi vapormaŝinojn.
2. Arbo. Have ideon pri io.
3. Portilo por vunditoj.
4. INV: adverbo. Mondopart'.
5. Centre de tipo. Rusia rivero. Flava metal'.
6. Orelfok'. Vicmontra numeralo.
7. Maldikaj tranĉoj.
8. Ripet' de la sama procedo en komputado.
9. Minerala aspekt'.

el nia fototeko



Sur la fona duoninsulo estas Gronlanda vilaĝo, kiun vidis grupo da partoprenantoj de la Rejkjavika UK, elektintaj tuttagan ekskurson al Gronlando, por vidi la grandiozecon de la nordo kaj kuraĝon de ĝiaj enloĝantoj.
(foto: Francisko L. Veuthey)



Zamenhof-festo en Mulhouse



Polaj infanoj kantas "alaŭdo"



Le Piont café Esperanto



Berlina Maratono